



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 3.
1973

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
40a (49a) jaro
DUMONATA

Historio de NORVEGA ESPERANTISTO.

Ĉu vi posedas malnovajn numerojn?

Ĉu vi rimarkis la indikon dekstre je la „kapo” de nia revuo: 3-a periodo, 39a (44-a) jaro? Kion tio signifas? Jen mallonge la historio de nia revuo:

En Decembro 1908 aperis „Specimena numero” de Norvega Esperantisto kun alvoko pri akcia societo. En 1909 la revuo aperis, sed sub la nomo Norvega Esperanta Gazeto, per 12 numeroj (10 kajeroj, el kiuj du aperis kiel duoblaj numeroj). Dum la jaroj 1910-1914 aperis ĉiujare 4-6 n.roj (3-4 kajeroj) sub la nomo Norvega Esperantisto, de 1911 eldonata de N.E.L. Tio estis la unua periodo.

De 1915 aŭ 1916 la sveda „La Espero” estis samtempe organo ankaŭ de N.E.L..

En 1922 Norvega Esperantisto reaperis en stencilita formo (12 numeroj?) kaj 1923-1924 denove presita (po 6-7 n.roj en 3-4 kajeroj jare). Ĝi ĉesis ĉar la presejo brulis. Tio estis la dua periodo.

En 1932 komencigis la 3a periodo. La titolo nun estis Esperantobladet. Aperis 10 numeroj jare. Interrompo okazis dum 2 1/2 jaroj dum la dua mondmilito (1943-Junio 1945), kiam aperis stencilita anstataŭaĵo „Meldinger fra Norsk Esperanto-Forbund” en 6 - 8 numeroj jare. De 1950 la revuo ricevis sian antaŭan nomon Norvega Esperantisto, kaj de 1960 ĝi ekhavis sian nunan formaton. De 1972 ĝi aperas reguligite dumonate.

De 1961 ensteligitis eraro de la numerado de la jarkolektoj: oni

forĝis ŝanĝi la numerojn, tiel ke kaj 1960 kaj 1961 aperis kiel 27-a (36-a) jaro, kaj poste dum 5 jaroj (1962-1966) restis en la parentezo: (37-a jaro)! Ekde ĉi tiu numero la numerado estas korektita.

Nun mi prezentas al vi

GRAVAN ALVOKON:

Kolektante dum la pasinta vintaro la jarkolektojn de nia revuo por la biblioteko de N. E. L. mi konstatis bedaŭrindajn mankojn. Kaj nun mi alvokas al ĉiuj sinceraj esperantistoj: ĉu vi posedas malnovajn numerojn aŭ jarkolektojn de nia revuo, kiujn vi volus donaci al nia biblioteko? Precipe interesas jenaj:

1-a periodo estas ĉe ni tre nekompleta. Same „La Espero” 1915-1921.

2a periodo komplete mankas!

3a periodo: 1932-1945 (inkluzive de „Meldinger”) estas tre nekompletaj. Cetero mankas precipe jenaj numeroj: 5/1946, 9/1951, 1-4/1952, 1,2,5/1953, 2/1954.

Estas tre grave ke oni klopodas savi kion eventuale niaj mortintaj pioniroj postlasis, antaŭ ol la parencoj ĉion forĵetas kiel senvaloraĵojn.

Interesas ankaŭ ĉiuj jarkolektoj de „Arbeider-Esperantisten” kaj de la diversaj Esperanto-revuetoj sporade aperintaj en nia lando tra la jaroj.

C. Støp-Bowitz.

La sankta Monto

La nomo Fuji konsistas el la skribsignoj por riĉeco kaj kavaliro. En la neniam akre konturitaj sed ĉiam poecemaj nocioj de la azianoj ĝi do devas signifi "La riĉeco de la kavaliroj" aŭ "Riĉeco je kavaliroj". Tion oni facile komprenas ĉe popolo, kies moroj baziĝas sur la vivomodo de la samuraj-kavaliroj. Oni ne plu scias, kiel aŭ kiam la nomo estiĝis. Jam antaŭlonge ĉi tiuj signifoj estas forgesitaj, kaj Fuji fariĝis la simbolo de la alteco, la beleco, la forteco, la pureco.

En pejzaĝo riĉega je strangaj, groteskaj kaj graciaj belaĵoj ĝi estas la sola monumenteca. Kun siaj 3778 metroj ĝi estas la plej alta monto de Japanujo.

Nia bildo montras la faman monton, kiel ĝin vidis la lignoskulptisto Fokusaj.



Adverb kan stá både til veró og til adjektiv. Vi henter eksempler fra teksten ovenfor: "Oni facile komprenas" og "Akre konturitaj". Man kan selvsagt si at konturita er en form av verbet konturi; partisippene er jo nettopp adjektiviske former av verbene.

Bli kan hete fariĝi eller estiĝi. Når man ser på betydningen av ordene fari og esti, vil man også lett kunne finne når å bli heter fariĝi og når det heter

estiĝi. I vår tekst: "La nomo estiĝis" og "La monto fariĝis simbolo". NB: Selvsagt ikke N-form (akkusativ) etter disse verbene.

ec og aĵ.

Ordene riĉeco, alteco, beleco, forteco, pureco skulle være tilstrekkelig til å vise hva ec-ordene betyr i forhold til de adjektiver de er dannet av.

Sammenlign: belaĵo.

Ak III.

Skolta Esperanto-Ligo

Atentigas la norvegajn Esperantistojn kaj Esperanto-klubojn pri la unika ebleco interniaj junuloj labori por la internacia lingvo:

La Mond-jamboreo okazos en Norvegujo! Malofte niaj skoltoj havos tian ŝancon renkonti la eksterlandajn skoltojn kaj fari internaciajn amikrilatojn! Nur la lingvaj baroj! Sed ni havas ion proponi!

DO : PROPONU!



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12.—.

Anonprezoj: 1/4 pago kr. 150.—,
1/2 p. kr. 75.—, 1/3 p. kr. 40.—,
1/6 p. kr. 20.—.

Frontpage vi trovas artikolon pri la historio de nia gazeto. Ĝi estas historio sen personaj nomoj. Tiuj nomoj ne apartenas en tiu artikolo. Sed la homoj ja estis tie.

Mi havis la ĝojon esti unu el tiuj homoj. Tiu ĝojon mi havis dum 25 jaroj — aŭ iom pli.

La ĝojo ne estis ĉiampura ĝojo. Ni devis batali kontraŭ diversaj malfacilaĵoj; kontraŭ la natura inerteco de kontribuantoj, kiuj ne ĝustatempe liveris promesitan materialon, kaj tiel plie malfrugis ĉe la presejoj, kiuj siaflanke montriĝis ankoraŭ pli inertaj; kontraŭ ĉiama premanta ekonomio; kontraŭ ĝenerala malemo en partoprenado de rimedoj kontraŭ tiu malbona ekonomio. Ĉi tio ne estas plendo. Estas nura konstato de faktoj. Aliajn same neplaĉajn faktojn ni lasas ĉi tie.

Jubileo devas esti okazo por festi. En ĉi tiu jubileo mi ŝatus prezenti mian tutkoran dankon pro la malgraŭ ĉio bona kunlaboro kaj la preskaŭ ĉiam glataj rilatoj kun la legantoj. Se mia posteulo havos la samajn spertojn, li estos gratulinda. Neniu devas timi antaŭ transprenado de la tasko. Ĉiuj sinproponoj estos serioze konsiderataj de la Estraro de NEL.

Kiel jam ofte aludite, kaj en leteroj kaj raportoj al NEL ofte substrekite, via nuna ĉefredaktoro nun ekŝiĝas. Kvarona jarcento sufiĉas.

Tio ne signifas, ke JHR ne plu kunlaboros en la gazeto. Mi promesas liveri materialon por preskaŭ ĉiuj numeroj. Mi promesas daŭrigi la poŝtmarkan agadon (kiu cetere estas tre temporaba), kiu permesis al la redakcio senpagan-afrankon kaj kontoraĵojn dum tri jaroj — sed kiu devas nun vigliĝi. (Kial nur la samaj kluboj partoprenas?)

La ĵus legitaj linioj do estas adiaŭo, danko — kaj invito.

JHR.

fosu vian sulkon




Kolekti uzitajn poŝtmarkojn por Norvega Esperantisto ne estas malfacila tasko. Ĉiu, nepre ĉiu, povas partopreni. Kelkaj kluboj kaj unuopuloj estis fervoraj. La plejmulto male.

Aĉeti uzitajn poŝtmarkojn kiel donacojn por la nepoj kaj nevoj ne estas tasko nur por svedaj legantoj. Montriĝas eble eĉ pluen vendi al neesperantistoj — almenaŭ en unu norvega urbo (malgraŭ du poŝtmarkvendejoj en la urbo!)

Ĉion pri poŝtmarkoj bonvolu adresi al J. Hammond Rosbach, 1700 Sarpsborg, ankaŭ la pagon.

Ekagu nun jam antaŭ la somero, daŭrigu dum la somero, faru tre multon post la somero.

Dankon!



Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna agado. La jarraporto de N.E.L. pri 1972 denove ne montr- as kreskon de la membronombro. Daŭre okazis tro malmultaj kaj tro malgrandaj kursoj, por kompensi la naturan perdon. La kotizenspezoj ne sufiĉas por daŭrigi nian normalan laboron, la kalkuloj montras defic- iton. Tio devas ne daŭri. Nur la kluboj kaj la rektaj membroj po- vas alporti ŝanĝon. La Liga Estraro tial denove insiste admonas al ĉiuj klubaj estraroj tuj kunveni por plani arangon de kursoj dum la venonta aŭtuno. Ni konstante vidas pruvojn pri kreskanta intereso en la publiko multloke en la lando. Per bone planita laboro oni povas kolekti interesiĝantojn por kursoj. Sed necesas plani la kursagadon en bona tempo. Do, ekagu jam nun! N.E.L. estas preta helpi per kurs- materialoj kaj konsiloj. Se neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Petu pri nia studplano. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi nian gazetkurson (skribu al N.E.L. pri regularo kaj provlecio). Sed komencu jam nun plani la aŭtunajn kursojn! - N.E.L. havas ankaŭ pli ol 100 rektajn membrojn. Certe ankaŭ multaj el ili povus starigi kur- son aŭ studrondon. Ni tial direktas ĉi tiun alvokon ankaŭ al ili. Ni petas ĉiun rektan membron, kiu estas preta fari klopodojn en tiu di- rekto, skribi al N.E.L., kaj ni plezure helpos ilin. Pasintjare 2 rektaj membroj sukcese laboris, sed nur du el pli ol 100! Post kurso aŭ studrondo oni povos fondi Esperantoklubon en la loko. Estas tre dezirinde fondi klubojn en multaj novaj lokoj.

Taskotabelo por kluboj. - Junio: La estraro planas la aŭtunan labo- ron kaj precipe decidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

Julio: Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 2-a jarkvarono kun studraporto pri la 1-a jarduono dorsflanke (blanko A 10 / E 1).

Aŭgusto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj. La estraro planas la kunvenojn de la venonta monato.

Septembro: La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 1-a jarkvarono. Okazis 2 estrar- kunvenoj, kaj oni elsendis 2 cirkulerojn. Oni pretigis la budgeton por 1973 kaj la jarraporton kaj la jarkalkulojn pri 1972. Oni starig- is la tagordon de la 43a Norvega Esperanto-Kongreso okazonta en Hau- gesund en Junio. Oni daŭrigis la laboron pri la eldono de la revizi- ta unua parto de la koresponda kurso. Oni komencis kolekti la bib- liotekon en la malnova oficejo en N. Slottsgt. 3.

La Liga Estraro.

Helsingør

La internaciaj ferias Esperanto-kursoj okazos denove en 1973 (22. - 29. de Julio) en la Internacia Atletojo de Helsingør.

Ni invitas vin veni por ĉeesti - kaj paŝigi neforesablajn tagojn en internacia rondo. Programo estas senpage havebla ĉe L. Friis, Ingemannsvei 9, DK-8230 ÅBYHØJ, Danlando.

Oficiala postkongreso en Ateno 5.-12. VII 1973

Programo:
Akcepto en Postkongresejaj salonoj
Inaŭguro en Postkongresejo
Vizito al teatro: Prezento de grekaj grafikaj dancoj
Paroladoj
Rondveturo en Ateno al Akropolis, muzeo de Akropolis, Kolonoj de Olimpia Jupitero, antikva vende- ejo, palaco, Atena Stadio k.t.p.
Rondveturo al marbordo de Saronikos
Vizito al Pasalimani, Pireeŝ, Glifada, Vuliagmeni, Sunion, (vizito al la antikva templo de Neptuno).

Tuttaga ekskurso al Argolido (Korinthos-Mikine-Argos-Nafplion -Epidavros) Vizito al antikvaj monumentoj. Tagmanĝo en Nafpli- on.

Tuttaga krosado per luksa vapor-

ŝipo al la proksimaj insuletoj Egina, Poros, Idra. Tagmanĝo sur la ŝipo.
Solena akcepto
Adiaŭa kunveno en la antikva tea- tro Pnika
Solena bankedo-balo en kampara taverno

Kondiĉoj kaj instrukcioj:
Limo: 1000-1200 personoj
Prezo: Ĉiu partoprenanto devas pagi sumon de 208 nederl. guldenoj. Tio donos al li la rajton parto- preni ĉiujn arangojn de la pro- gramo. Tiu prezo enhavas ĉion en la programo, t.e. manĝojn dum ekskursoj kaj en la bankedo, en- iron al teatroj kaj al muzeoj, rekompenco al gvidistoj, ĉiujn aŭtobusajn veturojn k.t.p. Ĉiu partoprenanto devos krome mem pagi siajn hotel-elspezojn.

por junuloj

En 1973 okazos la X-a Monda Festivalo de la Junularo kaj Stu- dentoj de 28a de julio ĝis 5a de aŭgusto en Berlino, la ĉefurbo de GDR. Tiuj festivaloj estas sen- dube la plej grandaj kaj la plej gravaj internaciaj junularaj ma- nifestacioj de la mondo. Pluraj dekmiloj da gejunuloj el pli ol 120 landoj de la mondo dum unu semajno renkontiĝos, diskutos pri aktualaj politikaj problemoj in- teresaj por la junularo kaj parto- prenos eksterordinare riĉan pro- gramon. Jam fariĝis bona tradicio ke ankaŭ junaj esperantistoj havu siajn specialajn renkontiĝojn en la kadro de tiu ĉi festivalo. Tio signifas ke ankaŭ en 1973 okazos specialaj renkontiĝoj pure esper- antistaj.

Skribu al Internationales Vor- bereitungskomitee der X. Weltfest-

spiele, DDR-108 Berlin, Mohrenstr., Deutsche Demokratische Republik.

Kopion de via letero sendu al: TEJO-sekcio de GDR, DDR-108 Berlin, Charlottenstr. 60.

*

KASTELO "GRESILLON" MODERNIĜAS

Dank'al la Kultura Asocio de la Kastelo Gresillon, kiu organizis subskripcion, la unua serio de laboroj por la konstruado de la ĉambrego por kursoj kaj prelegoj estas antaŭvidita por la printem- po.

La kasisto estas sinjoro Maurice Coussé, 11 rue Alain de Rouge, 72300 Sablé sur Sarthe, Francujo, kiu ĉiam ricevas kun plezuro la aliĝojn kaj donacojn.

"Kulturaj kajeroj" publikigos la liston de la donacintoj kaj de la membroj.

Someraj Universitataj Kursoj

Fine de la jaro 1972 en Lieĝo la asocio Someraj Universitataj Kursoj iĝis belga leĝe registrita asocio, tiel nomata "asocio sen profita celo", kies celo estas okazigi universitat-nivelajn kursojn, precipe dumsomerajn, kun Esperanto kiel laborlingvo.

La estraro de la S.U.K.-asocio konsistas el:

Prezidanto: Ernest Natalis, emerita profesoro de la Ŝtata Universitato de Liège

Sekretarioj: - Léon J. Hauregard, profesoro en la Ŝtata Supera Teknika Instituto en Verviers
- Uwe Joachim Moritz, gimnazia instruisto en Eschweiler

Kasisto: André Heck, asistento en la universitato de Liège

Konsilisto: Pol Denoel, doktoro pri medicino, prezidanto de Belga Esperanto-Federacio

Surbaze de la plena sukceso de la unua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj (Aŭgusto 1972) estas decidite ke la dua sesio okazos de la 4a ĝis la 25a de Aŭgusto 1974, denove en la modernaj ejoj de la Universitato de Lieĝo en Sart Tilman. Kompare al 1972 la nombro de la studdirektoj estas pligrandigita: okazos kursoj kaj praktikaj ekzercoj pri sociolingvistiko, biologio kaj kemio. Kiel la unua sesio ankaŭ la dua ampleksos studvizitojn, filmvesperojn, ekskursojn kaj perfektigan Esperanto-kurson.

Por garanti laŭeble altnivelan programon, la estraro de la S.U.K.-asocio elektis jenajn sekciajn prezidantojn: Kemio - profesoro S. Kawamura el la Kagawa Universitato de Mikityo (Japanio); biologio - profesoro C. Stöp-Bowitz el la Universitato de Oslo (Norvegio); Sociolingvistiko - d-ro J.C. Wells

el la Universitata Kolegio de Londono (Grandbritio).

Tiu ĉi dua sesio de S.U.K. certe estos grava paŝo en la direkton de ĉiujaraj kursoj kaj fine al normala universitata instruado helpe de Esperanto.

Pri kiuj ajn detaloj (programo, kotizoj, stipendioj, partoprenkondiĉoj, kurso-tekstoj k.t.p.) skribu al la S.U.K.-estraro: Someraj Universitataj Kursoj, Boite Postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgio).

PATROLA KONKURSO

LITERATURA KONKURSO SUB AŬSPICIOJ DE LA ITALA RONDO "LA PATROLO"

La literatura rondo "La Patrolo" organizas, enkadre de la 44-a Itala Esperanto-kongreso en Trento en Septembro 1973, literaturan konkurson laŭ jena regularo:

1) La konkurso estas internacia: Ĉiuj esperantistoj, escepte de la redaktoroj de Literatura Foiro kaj de la ĵurianoj, rajtas partopreni.

2) Ĉiu rajtas konkursi en ĉiu branĉo nur per unu verko, neniam premiita kaj neniam aperinta prese.

3) La branĉoj estas:

a) Originala Poezio (maksimume 50 versoj)

b) Originala Prozo (maksimume 200x65 tajpitaj spacoj)

4) La verkoj estu tajpitaj kun interlinia spaco. Oni sendu kvar kopiojn de ĉiu konkursaĵo. Sur ĉiu kopio estu skribita:

- la branĉo por kiu ĝi estas destinita

- la pseŭdonimo de la aŭtoro

Al la sendaĵo estu aldonita koverto entenanta slipon kun pseŭdonimo, nomo kaj adreso de la aŭtoro. Sur la koverton oni skribu nur la branĉon kaj la pseŭdonimon. Oni enmetu ankaŭ tri respondkuponojn por sekretariaj elspezoj.

5) Oni sendu ĉion (konkursajon, slipon en koverto kaj respondkuponojn) al jena adreso:

Patrolkonkurso 1973

Via Pantano 17

I-20122 Milano

6) Validas nur konkursaĵoj senditaj antaŭ la 11-a de Julio 1973 (laŭ poŝta stampo).

*

Informoj

Pri Esperanto en „Newsweek“.

La mondfama gazeto „Newsweek“ havis en sia numero la 19-an de Februaro ĉi-jare artikolon pri „The EEC and Babel in Brussels.“ t.e. pri ĉiuj lingvoj kiujn oni praktikas en la Komuna Merkato, kaj pri la malfacilaĵoj tiurilate.

En la numero de la 12-a de Marto de la sama gazeto aperas komentarioj de du legantoj, ambaŭ de Anglujo, kiuj tre forte rekomendas Esperanton por uzo en la Komuna Merkato.

Estas tre interese legi en tia mondkonata gazeto pri la lingva afero, tiu gazeto havas legantojn en multaj landoj, kaj estas tre respektata.

På Norsk

ESPERANTO SOM UNIVERSITETS FAG


Ved stadig flere universiteter verden over gis det nå undervisning i det internasjonale språket Esperanto. Universitetet i San Diego, California, er det siste som har tatt opp Esperanto blant sine fag. Det undervises etter helt moderne prinsipper, bl. a. ned språklaboratorium.

ITALIENSKE SOSIALDEMOKRATER ØNSKER ESPERANTO

Den italienske viseminister, sosialdemokraten Nicolazzi, har tidligere fremmet et forslag om å innføre Esperanto som fag i de italienske skolene. Nå har en delegasjon bestående av kjente sosialdemokrater bedt ministeren gjøre fortlgang med saken og få fremmet et lovforslag som gir adgang til å undervise i det internasjonale språket i landets skoler.

MILANOMESSEN BRUKER ESPERANTO

I likhet med mange internasjonale messer bruker også den kjente Milanomessen det internasjonale språket Esperanto i sin reklame. Messeplakaten med Esperantotekst lyder slik: „Internacia centro de la interŝanĝoj 14an - 25an de Aprilo 1973“ (Internasjonalt centrum for utvekslinger 14. - 25. april 1973).



DUPARTA KONKURSO-SERIO



Ĉar la ofset-metodo permesas malmultekostan uzon de bildoj, ni utiligas la okazon por prezenti novan konkurson. Ĉi tiu konkurso estas duparta:

A. Respondu al la demandoj koncerne la prezentitajn bildojn. Ne

gravas, ĉu vi respondas ĉiujn demandojn, aŭ se unu demandon vi ne povas respondi, ĉar vi devas kolekti premio-pontojn ĝis la fino de la serio. Tiu aŭ tiuj, kiuj ricevas la plej altan poentumon, ricevos premion.

B. Respondu al la demandoj koncerne la prezentitajn bildojn Alĉonu 5 kronojn (ĵen nova fonto por fortikigado de la ekonomio de Norvega Esperantisto!) En tiu ĉi parto de la konkurso premioj estas ĉiujfoje.



Atentu: Se vi partoprenas parton B, vi povas samtempe partopreni ankaŭ parton A, se vi tion deziras. Informu pri tio.

Jen la konkursaĵaj problemoj:

1. Malantaŭ la kapo de la Sfinkso montriĝas parto de piramido. Ĉiu piramido?
2. La virina kapo estas desegnita de fama artisto. Kiu?

3. La juna sportisto kun n-rol? sur la brusto fariĝis fama viro.

Kiu estas li?

4. La alia junulo ankaŭ paroliĝis pri si la tutan mondon.



Kiu estas li?

5. La turo apartenas al katedralo en urbo, kie okazis Universala Kongreso de Esperanto.

Kiel nomiĝas la urbo?

Respondojn bonvolu sendi antaŭ la 1-a de julio al

Redakcio de Norvega Esperantisto
Boks 942
Sentrum,
Oslo 1.

Ni esperas, ke tre multaj partoprenos.



prenos. Tre dezirinda estas granda partopreno en parto B de la konkurso.

Bonan sukceson!

Recenzoj

ALBERTO FERNÁNDEZ: „Senĝenaj dialogoj“. 208 paĝoj. STAPETO. Prezo: kr. 31,25.

Natursciencaj temoj estas tre aktualaj en nia tempo; sed multaj homoj timas ke tiuj temoj estas tre malfacilaj. En ĉi tiu popularscienciga prezento de fundamentaj demandoj de la naturo la aŭtoro pritraktas precipe fizikajn, ĉemikajn kaj biologiajn demandojn, kiel la gravito, la tempo, determinismo kaj la materio, kaj en la lastaj dialogoj li traktas la evoluismajn ideojn kaj starigas demandojn, kiuj rilatas al la homo kaj al ĝia signifo kiel biologia estaĵo. Li ekhavis la brilan ideon prezenti ĉi tiujn temojn en la formo de 20 dialogoj inter onklo kaj liaj du genevoj. La aŭtoro vere komprenas la temojn, kaj estas mirige kion li sukcesas prezenti kaj klarigi al simpla homo interesiĝanta. Kiel diras la eldonejo: „la dialogoj nature fluas en brue gaja atmosfero“. Kun plezuro mi senrezerve rekomendas la libron al ĉiu, kiu deziras popularan prezenton de subtilaĵoj de la naturo, kiu ĉirkaŭas kaj konsistigas nin. La lingvaĵo estas bona, flua, sed aperas kelkaj superfluaĵoj, novaĵoj kiel prepozicio far kaj prefikso retro-, kaj mi trovis kelkajn nebonajn zoologiajn terminojn: Koe-lenteroj (Celenteruloj), trilobitoj (trilobuloj), araknidoj (araneoidoj), marsupialoj (marsupuloj), agnatoj (senmakzeluloj). Bona papero kaj agrabla preso.

C.S.-B.

Ni ricevis:

Mi estas Pelé, membiografio de



la mondfama brazila „futbal-reĝo“ Edson Arantes do Nascimento, „Pelé“ (tre favora al Esperanto), tradukita de Francisko Almada. 166 paĝoj, bona lingvaĵo, multaj fotografaĵoj kaj desegnaĵoj. Prezo: kr. 38,70.

Membroj subtenantaj.

O. J. Rennevig
S. Kjetland.

La kontorfondaĵo.

Pli frue	kr. 244,10
G. & A. Høibo	" 15,00
T. Reiser, O. Øvsthus	" 25,00
R. Bugge-Paulsen	" 30,00
H. Friden	" 10,00
C.S.B.	" 20,00
M. Delor	" 100,00
J. Matland	" 50,00
S. Korstvet	" 20,00
„La Norda Luzzo“, Tromsø	" 100,00
	<u>kr. 614,10.</u>

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVojISTA
ASOCIO - NEFA

Kaldbakstubben 22, Oslo 19
Redaktoro: Odd Kolbræk



El „Vårt Yrke“:

LOKOMOTIVO KUN LA NOMO „REGO HAAKON VII“

Vaporlokomotivo kun signifo-plena historia valoro estas la lokomotivo - kun nr. 377 - kiu tiris la trajnon per kiu Reĝo Haakon VII la 9-an de Aprilo 1940 devis forlasi Oslo pro la invado de la germanaj soldatoj.

En 1969 ĉi tiu lokomotivo vendiĝis al privatulo en Anglio, s.ro Herald Pagano, kaj li dum du jaroj laboris kaj multajn litrojn da farbo aplikis por redoni al ĝi la originalan staton kaj koloron.

En Septembro 1971 la lokomotivo baptiĝis kaj ricevis la nomon „Reĝo Haakon VII“. Ĉeestis reprezentantoj de la Anglaj Fervojoj (British Railways) kaj de la radio kaj la televido, kaj ĉeestis multaj rigardantoj. La baptocermonion faris la norvega vickonsulo en Londono, s.ro Dag Ulnes. La baptodonaco de la Anglaj Fervojoj estis unu tuno da karbo.

El „Hungara Fervojista Mondo“:

NOVAJ RAPIDEGAJ TRAJNOJ EN ANGLIO

La Anglaj Fervojoj ekde Majo 1971 projektis uzi inter Glasgow kaj Edinburĝ rapidegajn trajnojn kun rapideco de 148 km/h. Per tiuj novaj trajnoj la nova veturdaŭro estas 43 minutoj anstataŭ 55 minutoj sur la 75 km longa distanco.

LA MODERNIGO DE LA FINNAJ FERVOJOJ

La finna kabineto, laŭ la pli frua decido, daŭrigas la elektrigon de la finnaj fervojlinioj. Por la 86 milionoj da finnaj markoj antaŭplanitaj por ĉi tiu celo oni dum la postsekvaj jaroj aĉetos 27 elektrajn lokomotivojn de Sovetunio kaj elektrigos la fervojlinion Helsinki - Seinäjoki.

Antaŭ la mendado de la elektraj lokomotivoj oni petis oferton ankaŭ de la hejma industrio, sed tiu oferta estis malpli favora ol tiu de Sovetunio. La fabrikado de interŝanĝ-pecoj por la elektraj lokomotivoj estas ebla en la finnaj fervojaj laborejoj, sekve de transdono de la soveta patento.

La unua elektrigita etapo inter Helsinki kaj Riihimäki (71 km) pretiĝis en 1972. La plua parto al Tampere (116 km) pretiĝis en 1974 kaj al Seinäjoki (159 km) en 1975.

El „Jernbanemanden“:

SOVETAJ ELEKTRAJ LOKOMOTIVOJ AL FINNLANDO

La unua elektra lokomotivo nun estas liverita kaj proveturigita. Ĝi i.a. proviĝis kun vartrajno kun pezo de 1600 tunoj, kun 80 km/h kiel la plej alta rapideco. Kaj la aŭtomate kaj la permanente kontrolita akcelo proviĝis, kaj la bremsaerpremo same kiel la elektra bremsosistemo aplikigiĝis.

Lastmomenta informo.

Jam sendinte al la redaktoro la frontpagan artikolon pri la historio de NORVEGA ESPERANTISTO mi trovis inter paperoj hereditaj de mortinta samideano ĉiujn numerojn de 1923 kaj la unuan de 1924. Nun mankas komplete nur la du lastaj numeroj de 1924 kaj la jaro 1922. Antaŭ ĉio estus grave trovi la jarkolekton 1922, ĉar ĝi aperis nur stencilite, kaj tial eĉ ne ekzistas en la Universitata Biblioteko de Oslo. Sed ankaŭ kelkaj pliaj ekzempleroj de 1923 - 1924 havus grandan intereson.

C.S.-B.

Programo de ISU fiksita.

La Estraro de UEA akceptis 10 proponojn por la 26-a sesio de Internacia Somera Universitato. Paranteze aperas la koncernaj temoj. W. Auld, Britujo (Naciismo kaj sennaciismo); d-ro W. Borman, FR Germanujo (Internacia komerco kaj valutoj); d-ro O. Haszpra, Hungarujo (Modeleksperimentoj kiel modernaj helpiloj de la hidroteknika planado); prof. I. Lapenna, Britujo (Bazaj ĵuraj principoj de la Eŭropa Ekonomia Komunado); prof. R. A. Lewin, Usono (Glitivaj mikroboj); d-ro H. M. Maitzen, FR Germanujo (Oro kaj alkoholo en la kosmo); prof. V. Peevski, Bulgarujo (La fotogrametrio kaj ĝia aplikado); G. Sredić, Jugoslavio (Ekonomieco de transportado de varoj en konteneroj); d-ro M. V. Stojenović, Jugoslavio (Mezepoka serba eposa heroo Marko Kraljević en balkanlanda folkloro); prof. A. P. Thewrewk, Hungarujo (Biblio kaj astronomio). Rektoro estos profesoro E. Pcpović, Jugoslavio.

Korespondu.

18-jara fraŭlino deziras korespondi. Skribu al s.ro prof. M. M. Joubert, 67, chemin Chaffauds, F-49000 ANGERS, Francujo.

Leif Sandberg 70-jara.

La 14an de Julio ingeniero Leif Sandberg farigos 70-jara. Li estis dum longa tempo estrarano kaj ankaŭ prezidanto de Klubo Esperantista en Oslo, sed plej konata li estas kiel nia muzikisto kaj komponisto de la brila Kluba Marso, kluba kanto de la klubo en Oslo kaj de aliaj melodioj dediĉitaj al Esperanto. Niajn korajn gratulojn kaj bondezirojn al la jubileulo!

C.S.-B.

UNESKO - NOVA ĴOJ.

Kiom da jaroj en lernejo?

Taŭ la Statistika Jarlibro de Unesco, 1971, ĵus publikigita, la tempo, kiun individuo pasigas en lernejo, estas malpli ol unu jaro en du landoj de Latina Ameriko, en deko da landoj en Azio kaj en dek kvin landoj en Afriko. Ĝi estis dek jaroj kaj duono por la meza usonano en 1960, naŭ kaj duono por brito en 1950, kaj kvin jaroj por sovetuniano en 1959.

(Informations Unesco kaj Informa Servo de UEA.)

RAPORTO DE U.N. KONDAMNAS ENORMAN MALSPARON KAŬZITAN DE ARMILKONKURO

Landoj, kiuj donas helpon al evoluantaj landoj, elspezis 25-oble tiom por militaj preparoj kiom por tia helpo dum la jaro 1970, laŭ raporto de Unuiĝintaj Nacioj.

La raporto kondamnas "la kriantran kontraston" inter la "enorma malŝparo" pri armilkonkuro kaj la neplenumitaj bezonoj de evoluigo.

(Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)



La Ŝipestro kaj Maljuna-Eriko

Iam vivis Ŝipestro, kiu estis en ĉio, kion li komencis, neklarigeble bonŝanca. Neniu krom li ricevis tiajn ŝarĝojn, kaj neniu gajnis tiom da mono, ĉar la mono ŝajne sin ĵetis al li, kaj speciale neniu kapablis kompari sin kun li dum vojaĝoj, ĉar kie ajn li vojaĝis, la vento blovis en la vojaĝdirekto, jes, oni diris, ke se li nur turnus sian ĉapelon, la vento sin turnus laŭ ĝi.

Tiel li vojaĝis dum jaroj, kaj en la lignotransporto, kaj en la Ĉinujo-trafiko, kaj monon li gajnis kiel herbo. Sed iam li rapidis hejmen trans La Norda Maro per ĉiuj veloj, kvazaŭ li estus ŝtelinta kaj ŝarĝon kaj ŝipon.

Sed iu lin ĉasis, kaj li eĉ pli rapidis. Estis Maljuna-Eriko (la diablo rim.de trad.), ĉar kun li la Ŝipestro iam skribis kontrakton, kiel oni ja facile povas kompreni, kaj en tiu ĉi tago la tempolimo pasas, nun ĉiunomente li povas atendi lian alvenon por lin kunpreni.

Nu, la Ŝipestro venis sur la ferdekon el la kajuto, kaj poste al la supro de la takelaĵo, kaj tiam li vokis la ĉarpentiston kaj ankoraŭ kelkajn virojn, kaj ordonis ke ili iru malsupren en la ŝarĝujon kaj haki du truojn trans la fundon de la ŝipo, kaj farinte tion meti la pumpilojn tien, tiel ke akvo ne venis al la ŝarĝo sed staris alte en la pumpiloj.

La viraro kompreneble miris pro tio, kaj opiniis tion strangege laboro, sed ili faris laŭ la ordono de la Ŝipestro, ili hakis du truojn kaj tien metis la pumpilojn kaj faris tian laboron, ke eĉ ne akvoguto venis al la ŝarĝo, sed en la pumpilojn la maro penetris ĝis sep futojn.

Ili apenaŭ finiĝis sian laboron, ke la elhakitaĵo ne estu videbla, kiam Maljuna-Eriko alvenis en iu ventblovo kaj prenis la Ŝipestron per la kolumo.

"Momenton, ne tiel urĝas", diris la Ŝipestro, kaj tuĵ komencis sin liberigi de la ungegoj kiuj tenis lin. "Ĉu vi ne faris kontrakton kun mi, ke la ŝipon vi ĉiam tenos densa kaj senakva?" diris la Ŝipestro. "Ho, vi ne estas fidinda. Mezuru la akvon en la pumpiloj! La akvo penetris ĝis sep futojn en la tuboj. Pumpu, diablo, kaj pumpu ĝis venos ne plu akvo en la pumpilo, kaj poste prenu min al la infero, se vi tion deziras!"

Maljuna-Eriko ne estis tiel saĝa ke li ne lasis sin trompi. Jen li eklaboris kaj ŝvitegis, tiel ke la ŝvito fluis kiel riveretoj laŭ lia dorso, kaj oni povus uzi tiuj riveretojn por muelilo plej malalte ĉe lia postaĵo, sed li pumpis el la Norda Maro kaj en la Nordan Maron. El tiu laboro li iom post iom laciĝis, kaj kiam li ne plu eltenis, li enplena furiozo rapidis hejmen al sia prava avino por ripozi.

La Ŝipestron li lasis resti ŝipestro dum li mem volis, kaj se li ne estas jam mortinta, li certe ankoraŭ vojaĝas kaj velas tien, kien li volas, kaj turnas la venton laŭ turno de la ĉapelo.

(Norvega popolfabelo laŭ Asbjørnsen. HAR)



KRISTIANSAND

Jarkunveno 15.2.1973 ĉe Vik, La Bela Kampo. Reelektoj, kafo kaj mango - kaj paroladoj. J.A.W.

*
Oalo

19.2.73. La vicprezidanto Thor Magnus Carlsen malfermis la kunvenon.

La raportoj estis aprobitaj sen rimarkigoj. - Ni estis speciale atentigitaj pri la jarkunveno la 6.3.73 kaj instigitaj antaŭe legi la jarraporton.

Stefan Murak rakontis al ni pri sia laboro en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Malnova, tre eluzita domo. Malgraŭ tio ke ĉie troviĝas libroj en tiu domo, tamen loko por libroj mankas! Murak diris ke li tute ne povas kompreni kiamaniere oni povis trovi difinitan libron tie. Sed d-ro Sadler, direktoro de C.O., tamen trovis ĉar li konas ĉion kaj faras ĉion! Certe li ankaŭ dormas; sed nia amiko Stefan Murak ne scias kiam li tion faras! Ni almenaŭ devas supozi ke d-ro Sadler estas iu tre eksterordinara homo.

Unu el la taskoj de Murak dum lia deĵorado en la C.O. estis reordigi la libro-amasojn, kiel ekzemple amason da libroj sub tablo, laŭdire nevendeblaj, kiujn li tamen bone sukcesis disvendi!

Ni komprenis ke vendi librojn al tiel nomataj nepagipovaj landoj estas malfacila tasko, sed oni ofte povas sukcese interŝanĝi librojn. Oficiale mendi librojn de tiuj landoj montriĝas esti kaŭzo de malagrablaj surprizoj aŭ almenaŭ ofte malfacila tasko. Tion C. Stöp-Bowitz povis konfirmi.

Stefan Murak sukcesis doni al ni la impreson ke li travivis impresoriĉajn tagojn en Roterdamo.

John Berggreen donis al ni multajn bonajn konsilojn kiel atingi fluan parolkapablon en Esperanto. Li akcentis speciale kiel multe gravas legi kaj precipe voĉlegi, aŭskultante sian propran voĉon.

Ĉeestis 23 membroj. Pepita

*
6.3.73. Dum la kunveno okazis Ĝenerala Kunsido. Elektigis jena nova estraro:

Prezidanto: Pepita de Caspary (n)
Vic.prez.: Thor Magnus Carlsen (r)
Sekr.korespondanta: Kirsten Ek (r)
" raportanta: Odd Kolbrek (n)
Kasisto: Lovise Bøe (r)
Estraranoj: Brynhild Østmo (r)
Aase Gustavsen (r)
Anstataŭantoj: Randolf Grotmål (r)
Harda Danielsen (r)

(n = nova - r = reelektita)

Post la ĝenerala kunsido Thor Magnus Carlsen gvidis tre interesan divenkonkurson - kun premioj. Harda

*
19.3.73. La prezidantino Pepita de Caspary faris paroladon pri la kristnaskaj kutimoj en Hispanio, kie ŝi restis dum la kristnasko. Ŝi montris lumbildojn de diversaj lokoj tie, de Esperantaj kunvenoj kaj de hejmoj por ke ni vidu kiel oni en Hispanio festas la kristnaskon. Fine ŝi bele kantis hispanan kanton en Esperanto.

Kari Kalsås donis informojn pri sia preparado de la karavano per aŭtobuso al la UK en Beogrado kaj montris belajn broŝurojn pri tiuj lokoj kiujn la karavano travojaĝos.

3.4.73. La prezidantino Pepita de Caspary bonvenigis nin.

C. Stöp-Bowitz donis informojn pri Norvega Esperantisto - interalie pri la poŝtmarkokolektado kiu grave apogas ĝian ekonomion, pri la nova presmaniero - kaj pri la landa kongreso en Haugesund.

Pasis 100 jaroj post kiam d-ro Armauer Hansen trovis la leprobacilon. Kirsten Ek faris interesan paroladon pri tiu plej malnova malsano de la homaro. Dum la tempo de la vikingoj ĝi venis al Norvegio, kiu fariĝis plej infektita lando en Eŭropo. Ŝi parolis pri la teruraj vivkondiĉoj en malnova tempo, izoligo de malsanuloj, primitivaj vivmanieroj, kiuj speciale en Norvegio kaŭzis disvastiĝon de la lepro. - Fine ŝi priparolis la malsanulejojn kaj la kuracistojn, unuavice doktoron Armauer Hansen.

*

16.4.73. La prezidantino bonvenigis nin kaj gratulis al nia klubano Tharald Dybing okaze de lia 89-jara naskiĝtago.

La programo estis "Paskoamuzaj-oj". Ni provis doni ĝustajn respondojn al 10 demandoj. Al ĉiu demando ni elektis inter 3 indikitaj respondoj.

C. Stöp-Bowitz informis ke post aperigo de artikoloj pri Esperanto en "Verdens Gang" kaj "Det Nye" montriĝas intereso inter la junuloj, - interalie pluraj mendis leterkurson.

Harda Danielsen rakontis pri Madeiro, de kie ŝi ĵus revenis, kaj salutis de la UEA-delegito kaj de la ceteraj esperantistoj en Funchal.

Dum ni trinkis kafon, okazis la kutima lotado, kaj ni rakontis anekdotojn.

O. Kolbrek

*

Haugesund

La decembra kunveno de "Mara Vento" okazis kiel kutime en la fest-salono de Skipperforeningen kaj en festa kadro - estis ja la lasta kunveno de la jaro. En la bele ornamita ejo kunestis duoncento da geanoj kaj geamikoj kaj en festa atmosfero oni agrable kaj gaje pasigis la vesperon kaj eĉ parton de la nokto.

Ĉe la tablo la prezidanto faris paroladon pri d-ro Zamenhof, kaj sekvis kantado kaj vigla interparolo.

Programulo de la vespero estis la prezidanto, kiu rakontis pri rond-vojaĝo en Ameriko post la kongreso en Portland, Oregon. La rakontadon akompanis serio de plaĉaspektaj kolor-lumbildoj.

Kiel en pli fruaj antaŭ-kristnaskaj kunvenoj tablo estis plena de ellotaĵoj diversgrandaj kaj -formataj, kaj la pli posta ellotado tre bone sukcesis. La neta mon-gajno estis tre kontentiga.

Al la gvidantino de la komenca kurso, Jarmila Ŝestakova, estis transdonata donaco kun dankaj vortoj de la gekursanoj, same al la prezidanto per unu el la animoj de la daŭriga kurso, kiun li gvidis.

Getere oni kantis kaj ludis, - kaj dum la fina parto de la festa kunveno oni dancis laŭ la logaj tonoj de l' tirharmoniko.

*

"Mara Vento" okazigis la unuan kunvenon en la nova jaro 11-an de januaro. La prezidanto bonvenigis petante aktivan kunlaboron de la geanoj por bone solvi la taskojn aktualajn. La plej grava tasko estos la aranĝo de nia landa Esperanto-kongreso - komence de junio. Kiel aranĝ-komitato elektigis la estraro kompletigita per

Kjell Stokland, Klara Dahl kaj Malfrid Blikshavn.

Por propagandi por partopreno en la UK en Beogrado, la programo de la vespero temis pri la kongreslando. Estis pruntite kelkaj filmoj de la jugoslava ambasadejo en Oslo, filmoj tre interesaj - pri naturo, popoloj kaj kutimoj de tiu bela kaj vizitinda lando.

Estis referata cirkulero pri la aranĝo de landa kongreso en Haugesund.

Ref.

Sauda

Jubilea festo

Tiun ĉi jaron nia klubo havas 35 jarojn, kaj pro tio ni aranĝis malgrandan feston ĉe gesinjoroj Matland 11.12.72. (La klubo fondiĝis 22.3.37).

La prezidantino malfermis la kunvenon per bonvenigaj vortoj, kaj poste ŝi laŭtlegis poemon de Zamenhof. Komuna kanto: "Amikoj kantu kun ĝoja kor".

Norman Birkeli estis la festa ĉefparolanto. Li faris ampleksan kavalkadon pri la klubo de fondiĝo ĝis hodiaŭ. - Kelkaj el la nunaj anoj estas membroj de la fondiĝo ĝis nun, kaj ili ankaŭ rakontis pri diversaj kaj amuzaj kaj pli gravaj okazintaĵoj de la klubo kaj de la membroj.

Salutoj alvenis de N.E.L., Mara Vento, Emil Håland kaj Rasmus Nærheim. De Mara Vento la klubo ankaŭ ricevis donacon: Belan glason kun gravurita surskribo.

Ellotado de diversaj objektoj, inter ili du belaj broĉoj faritaj de Olav Andersen. Poste ni altabiigis. Nia dommastrino regalis nin per tre bongustaj manĝaĵoj. Kantado, iom da muziko de Norman

Birkeli. Nia plej aĝa membro, Karen Berge, deklamis "La Vojo".

Pro aliaj neatenditaj okupoj Johan Matland bedaŭrinde ne povis kunesti. Alie ankaŭ li kontribuis al la festo.

14.3.73. Klubkunveno ĉe gesinjoroj Birkeli.

Malfermo per kanto de Haugesund-sangen, kiu Johan Matland ĵus bone tradukis en Esperanton. - Klubaj aferoj estis pritraktataj, kaj poste Johan Matland gvidis la lingvan duonhoron. Ĝi pritraktis tradukon de "Sjømennes Minnehall i Stavern" al Esperanto.

Norman Birkeli diŝdonis slipojn kun 20 demandoj, kiujn la ĉeestantoj provis solvi per ĝustaj respondoj, ĉu per jes aŭ per ne.

Interpaŭze nia dommastrino regalis nin per bongusta manĝaĵo. 71% el la membroj ĉeestis la kunvenon.

*

19.3.73. Klubkunveno ĉe gesinjoroj Matland.

La sekretario laŭtlegis referaĵon de la lasta klubkunveno. La prezidanto gvidis la lingvan duonhoron. Ĉifoje iom pli malfacilaj taskoj. Kafopaŭzo.

Johan Matland montris al ni belajn kolorbildojn de diversaj lokoj de en- kaj eksterlande, entute 25. La ĉeestantoj divenu, kiujn lokojn ili montras. Olav Andersen gajnis per 11 ĝustaj respondoj.

Sekr.



Korespondu

52-jara finna S-ino deziras korespondi kun norveg(in)oj pri diversaj temoj. Sinjorino Hilka Orrda, Salo, SF-25350 HÄNTÄLÄ, Finnlando.

22-jara japana studento deziras korespondi kaj kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn kaj monerojn kaj interesigas sin por Norvegio. KIMURA AKITOŠI Adr. 804 KITAKY-USYU-SHI TOBATA-KU, SENSUI-CHO 2 - I MEISEN-RYO, JAPAN.

Mi deziras havi junajn geamikojn en via lando kaj korespondi kun ili. Jadwiga Zaprzalska, ul. Droga Męczenników Majdanka 32/45, PL-20-334 LUBLIN, Polujo.

Knabo de la sesa klaso deziras korespondi kun samaĝa knabo. Györgyi Zsiga, Béke út. 91a, H-2659 ERSEKVÁDKERT, Hungarujo.

Mi tre deziras firman korespondant(in)on en via lando. Nepre sendu la leterojn registrite. Vladislav Viršila, PANEVEŽIS, a/d 67, Litovio, U.S.S.R.

Por mia kurso de Moderna Eŭropa Historio (mi estas 16-jara studentino de Pittsfield Altlernejo) mi bezonas informojn pri la rezistmovado kontraŭ la Naziaj okupantoj dum la dua mondmilito, kaj pri revenĝaj agoj de la Nazioj. Shirley Boschen, 195 Partidge Road, PITTSFIELD, Mass. 01201, Usono.

Mi serĉas kunlaborantojn por tradukado, eldonado kaj disvastigado de la verkoj de K.O. Schmidt en Skandinavio. Alfred-Richard Walther, Birkenwaldstrasse 168, D-7 STUTTGART - 1, Germanujo.

Mi serĉas filateliston, kiu bonvolus interŝanĝi poŝtmarkojn de la Nordaj landoj kontraŭ tiuj de Francio. Jean Saugère, Chemin de Chandonnet, F-23000 GUÉRET, Francujo.

20-jara knabo, komencanto, bildkaj sonteknikisto de la Hungara Televidejo, deziras korespondadon kun 16-22-jaraj knabinoj kaj knaboj. Interesoj: elektroniko, amatora fotografado kaj filmado, muziko, belartoj, gastronomio. Jeney Ferenc, Magyar Televízió, IV.em. 54, Szabadság tér 17, H-1810 BUDAPEST 5, Hungarujo.

Mi serĉas gekorespondantojn en via lando. Mi estas 42-jara instruisto. Ĉefaj interesoj: puraj aŭ uzitaj poŝtmarkoj, belaj bildkarto, sporto, turismo, vivo k. t. p. Wojciech Szczakowski, ul. Mokra 23 m. 59, ŻÓDŹ 11, Polujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo

Telefon: 69 14 39

Kontorid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo

Postgiro 100:32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo

Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,

Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.

Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto

Boks 942, Oslo 1

ØKONOMI-TRYKK, Postboks 24, 8001 BODØ